

HORIZONTO

V-a JARO N-o 26 (2)

MARTO - APRILO 1980

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



lanka Lago
(1054 m.)

LIBROJ SUB LA LUPEO

REALAĴOJ KAJ MITOJ PRI LA ALSACA LANDO

KVAR POPULARAJ KANTOJ

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.^o de la Constitución, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76

N.^o 2 - Morto - Aprilo 1980

ENHAVO

LIA MOSTO PROFESORO MIGUEL
SANCHO IZQUIERDO, 90-JARA (Salva-
dor Gumá)

SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA
ESPERANTO-MOVADO aŭ PSEŬDOS-
CIENCA... (Ivo Lapenna)

NOVA SCIIGO PRI LA INTERNACIA
FAKVORTARO EN 9 LINGVOJ (Bruno
Vogelman)

REALAĴOJ KAJ MITOJ PRI LA ALSACA
LANDO (M. M.)

BELETRO

Mi estas tiu floro (trad. Liven Dek)

Kvar popularaj kantoj (trad. J. Ben Alter)

FESTPAROLADO DE LA 19-aj INTERNA-
CIAJ FLORAJ LUDOJ... (Salvador Gumá)

HUMANECA FARO EN ALBERNDORF
(AŬSTRUJO) (Klaus Perko)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)
(Redaktas Ivo Lapenna)

JUBILEAJ DATREVENOJ

PENSOJ DE ZAMENHOF

Pri la Evoluo de la Internacia Lingvo

Pri Literaturo

LIBROJ SUB LA LUPEO (Recenzas: Sal-
vador Gumá, G. Mora i Arana)

KIEL ABONI

Abonojn al «Horizonto» akceptas la ad-
ministracio: Inés Gastón, Paseo de la
Constitución, 35, Zaragoza-1, Hispanujo.
Pĝk. Zaragoza 00428398. (Jarabono por
Hispanujo kaj Portugalujo 600 ptoj., por
eksterlando 700 ptoj. aŭ 12 usonaj dola-
roj), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
GRAZ. Pĝk. Graz 1257.845. Jarabono:
160,— S.

Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON
N13 4UL. Pĝk. 37.507.9106. Jarabono: 7 £.

Danlando:
Peter Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610
RØDOVRE, Pĝk. 6287859. Jarabono: 70,—
D Kr.

Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101
KUOPIO 10, Pĝk. KU 152801-5. Jarabono:
50,— F. Mk.

Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 PARIS. Pĝk. Paris 21.670.96 V.
Jarabono: 50,— Fr.

FR Germanujo:
Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
MÖHNESEE-GÜNNE. Konto-Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85). Ja-
rabono: 24,— DM.

Grekujo:
Adda Sakelaropoulou, Sokratous 88 Omo-
nia, ATHENO 101. Jarabono: 380,— Grekaj
Drakmoj.

Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH
TIKVA. Pĝk. Bank Hadoar, 4458548.
Jarabono:

Jugoslavio:
D-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10,
YU-41000 ZAGREB. Jarabono: 216 n. din.

Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO
Ont. M4S 2V2. Jarabono: 14,— \$.

Luksemburgo:
Wickler Albert, OLM. Pĝk. 54175-49. Jara-
bono: 380 lfr.

Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502
R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el
tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando
estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel
perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

LIA MOŜTO PROFESORO

MIGUEL SANCHO IZQUIERDO, 90-jara

La proksiman 17-an de junio nia samideano plenumos naŭdek jarojn.

Lia vivo longa, plene dediĉita al studado kaj instruado ĉiam sub la signo de l'espero kaj humaneco, meritas — aŭ trudas — ke ni esprimu nian admiron kaj dankon pro la malfacile taksebla valoro de liaj servoj al nia Movado. Ni ne devas preterlasi la okazon ĉar ni multe ŝuldas al li. Li estis plene fidela al nia idealo kaj dum 72 jaroj — krom la ne eviteblaj paŭzoj en la vivo — li ĉiam staris firme en niaj vicoj.

Kiam en la jaro 1908-a fondiĝis en Zaragoza la Societo «Frateco» li tuj aniĝis — li estis 18-jara — kaj tre aktive kunlaboris. Unu jaron poste li partoprenis la 5-an Universalan Kongreson en Barcelona.

En la jaro 1911-a li fariĝis sekretario de tiu Societo kaj vizitadis kurson de Esperanto en la Universitato de Zaragoza, kio havigis al li Diplomon.

Daŭre li diskonigis Esperanton per prelegoj kaj kursetoj. Mi ekkonis lin en la jaro 1954-a, okaze de la 15-a Hispana Kongreso. Li sidis sur la podio kun la prezidantaro, en la Universitato de Zaragoza.

En la jaro 1959-a li vojaĝis kun aliaj samideanoj — ankaŭ mi — al la grandioza Universala Kongreso en Varsovio kaj li salutis la kongresantojn en la nomo de la Hispana Federacio.

En la jaro 1963-a li fariĝis Prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, kiun li majstre gvidis dum sep jaroj, do ĝis la 1969-a en politike tre malfacilaj cirkonstancoj, ĉar oni facile ĝeneraligas kaj tial atribuas al idealo la nuancojn de ĝiaj reprezentantoj. Lia prestiĝo kaj graveco levis tre alten la neŭtralecan renomon de Esperanto kaj tial nia Movado ne puŝiĝis kontraŭ konsiderindaj baroj dum tiu epoko kaj povis glate disvastiĝi en la tuta lando.

En la jaro 1967-a li estis nomita Membro de la Honora Patrona Komitato de U.E.A. En la jaro 1969-a, kiam li ĉesis esti Prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, oni nomis lin ĝia Honora Prezidanto.

En la jaro 1968-a kreiĝis la «Fonduso Esperanto» por diskonigi la Internacian Lingvon kaj kun lia helpo kaj kunlaborado oni prosperis ke la Fonduso estu oficiale klasita «Benefica-Instruada».

Ne nur morale sed ankaŭ mone, per premioj li kontribuis al tiu Fonduso. Li plu estas Prezidanto de la Societo «Frateco» ĉar pro honoro al li oni rifuzas lian ĉiujaran «Mi ĉesas».

Laŭdadon kaj flatadon li ne bezonas kaj mi ne ŝatas fari; sed mi petas, li volu pardoni al mi la kuraĝon prezenti tiel nekompletan kaj eĉ mizeran priskribon pri la esperantista faceto de intensa, intelekta vivo, ĉar lia biografio necesigus densan libron.

Salvador Gumà

SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

AŬ

PSEŬDOSCIENCA PARTIPOLITIKA KONCEPTO PRI LA INTERNACIA LINGVO

En 1978 Hungara Esperanto-Asocio eldonis libron, kiu meritas ne mallongan recenzon, sed iom pli ampleksan pritrakton. Temas pri *Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado*, redaktita de Detlev Blanke, la ĉefa «ideologo» de la unutenenca kaj unudirekta partipolitika alo de la nuntempa Esperanto-Movado, senreziste esprimiganta kaj aganta en la nuntempa UEA.

La 228-paĝa libro konsistas el Enkonduko, verkita de la redaktinto, kaj tri partoj: Historio, Ideaj Fontoj, Perspektivoj.

En la unua parto troviĝas artikoloj de A. Rátkai pri «Socialismaj Teorioj kaj la Internacia Laborista Asocio pri la Universala Lingvo», S. N. Podkaminer: «Lenin kaj Esperanto», D. Blanke: «La Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE)» kaj «Pri la Kontribuoj de la Laboristaj Esperantistoj por la Evoluoj de la Germana-Soveta Amikeco en la Tempo de la Respubliko de Weimar», fine U. Lins: «Esperanto dum la Tria Regno». La dua parto enhavas artikolojn de E. K. Drezen: «Zamenhof», A. Rátkai: «La Internacilingva Movado kiel Kreinto de la Internacia Lingvo», kaj plian fojon D. Blanke: «Pri la 'Interna Ideo' de Esperanto». Du artikoloj — unu de M. I. Isajev «Pri Bazaj Metodologiaj Problemoj de Interlingvistiko», la alia de S. N. Podkaminer pri «Socialismo kaj Internacia Lingvo» — konsistigas la trian parton. Preskaŭ ĉiuj menciitaj tekstoj estis publikigitaj pli frue ĉu kun identa, ĉu kun simila enhavo. Sekve, la libro prezentigas pli kiel kolekto de jam aperintaj artikoloj, ol kiel unueca verko prilumanta diversajn aspektojn de la sama demando per kunordigitaj originalaj studoj, kiel kredigas la titolo.

En sia Enkonduko la redaktinto informas, ke «evidente la aŭtoroj de la studoj ĝenerale klopodis bazi sin sur postmilitaj vidpunktoj de la historia materiismo, de marksismo-leninismo, sed ke «tio ne validas por la verkaĵo de Ulrich Lins» (p. 6). Evidente, almenaŭ Drezen ne ovis sin bazi sur la «postmilitaj vidpunktoj de la historia materiismo» (cetere kiu el tiuj vidpunktoj?), ĉar li verkis sian artikolon longe antaŭ la milito kaj, krome, en tiu tempo la oficiala soveta doktrino ne estis nomata «marksismo-leninismo», sed marksismo-leninismo-stalinismo. Senkonsidere al tiu eraro, relative sensignifa kompare kun la abundo da multe pli gravaj, estas klare, ke la libro pretendas esti scienca

verko bazita sur la soveta varianto de marksismo-leninismo. Leninisma ĝi eble estas, marksisma tre dubinde, scienca verko certe ne.

POR KE VERKO ESTU SCIENCA NE SUFICAS NOMI ĜIN TIA

Por science pritrakti kiun ajn demandon antaŭ ĉio estas necese akiri maksimuman scion pri la koncernaj faktoj kaj honeste prezenti ilin. Nur post tio povas sekvi analizoj kaj sintezoj, eltrovo de la leĝoj, kiuj regas la ekzamenatan fenomenon ĉu en la naturo, ĉu en la socio, en ligo kun aliaj fenomenoj kaj kiel parton de dinamisma evoluprocezo, ne kiel statikan staton. Siavice tio postulas grandan ĝeneralan erudicion kaj specialajn sciencajn kvalifikojn. Grandega, fakte kontraŭscienca eraro estas agi inverse: unue arbitre formi propran opinion kaj poste aŭ inventi «faktojn», aŭ serĉi tiujn faktojn, kiuj apogas ĝin ellasante aŭ ignorante ĉiujn aliajn. Por uzi la plej mildan esprimon, tion oni nomas prejudicio. Eble neniu socia fenomeno renkontis kaj plu renkontas tion da prejudicioj, kiel la Internacia Lingvo (Esperanto). Ne nur ekster la Esperanto-Movado, sed bedaŭrinde ankaŭ interne de ĝi, kiel evidentiĝas la pritraktata libro, malgraŭ bonegaj verkoj, el kiuj eĉ D. Blanke, sendube la plej inteligenta el la «ideologoj», sur p. 7 aparte mencias la «valoregan» *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)*.

Rilate la faktojn ekzistas pluraj eblecoj. Se al aŭtoro mankas amaso da elementaj scioj, oni prave nomas lin ignoranto; se en lia verko troviĝas nur kelkaj eraroj pri faktoj, precipe se ili ne estas decidaj por la konkludoj (eĉ en la plej rigoran sciencon verkon tiaj povas enŝteliĝi), estas lojale paroli nur pri malĝustaj; sed se iu intence ellasas konatajn faktojn aŭ konscie misprezentas ilin, la sola adekvata kvalifiko estas: falsajo. Kvankam en la analizata libro troviĝas ankaŭ kelkaj interesaj novaj informoj — ekzemple en la artikolo de Podkaminer pri la rilato de Lenin kaj de Krupskaja (edzino de Lenin) al Esperanto — tamen la tri kategorioj — ignoradoj, malĝustaj, falsajoj — pli ol abundas kaj kompletigas unuj la aliajn. Jen nur kelkaj el ili por montri ilian karakteron:

Estas falsajo publikigi la artikolon de E. K. Drezen pri Zamenhof kaj ne diri unusolan vorton pri la fakto, ke li estis

mortpafita en 1937 de la servopretaj ekzekutistoj de la soveta reĝimo kaj ke similan sorton havis tre multaj sovetaj esperantistoj malgraŭ ilia humila kliniĝado antaŭ la oficiala soveta linio, dum centoj, eble eĉ miloj da aliaj pereis pro la suferigaj punlaboroj en la siberiaj koncentrejoj. Laŭ U. Lins, eĉ en GDR oni «foje parolis pri 2.000 mortintoj» (*EeP*, p. 723), kion D. Blanke ne povas ne scii. Ne estas surprize, ke U. Lins, kiu pli frue aŭdacis honeste prezenti la veron pri la persekutoj de esperantistoj en Soveta Unio, ne povas esti rigardata de D. Blanke kiel «marksisto-leninisto», kion, por ĉiu okazo, necesis eksplicite mencii en la Enkonduko. Surprize estas, ke U. Lins konsentis pri la publikigo de sia studo rilatanta al la persekutoj en la nazia Tria Regno, sed permesis, ke en la libro estu komplete ellasita lia studo pri la persekutoj en Soveta Unio, tempe paralelaj, karaktere samspecaj kaj laŭ la sekvoj eĉ pli kruelaj kaj hontindaj koncerne la esperantistojn (mi intence tuŝas nur la «Esperanto-aspekton»), ol tiuj de la hitlera reĝimo. Tiu ellaso estas plia falsajo, kiun ne povas pravigi la noto en la fino, ke pliaj detaloj pri la sama temaro troviĝas en *EeP* p-oj 697-747.

Estas strange, ke U. Lins publikigis en la libro la koncizigitan version de sia artikolo, aperintan en 1968 en n-ro 96 de *Senacieca Revuo*, anstataŭ publikigi la kompletigitan finan tekston pri la persekutoj sub nazismo, aperintan en 1974 kiel ĉap. 21.3 de *EeP*. Tial eĉ en lia artikolo troviĝas malĝustajtoj. Ekzemple, li asertas, ke komence de la jaro 1940 en Jugoslavio oni skribis memkritikon pri la «ŝafa» neŭtraleco de la internacia movado rilate naciisocialismon kaj li citas parton de artikolo de J. Grandja en *La Suda Stelo* n-ro 9/1940. U. Lins komentas: «*Sed tiaj saĝaj vortoj venis malfrue, kiam la decidaj jaroj de la batalo inter faŝismo kaj Esperanto estis jam pasintaj*» (p-oj 103-104). Tio implicas, ke eĉ en Jugoslavio nur en 1940 oni komprenis la kontraŭhomecan kaj tial ankaŭ kontraŭesperantan karakteron de naciisocialismo. Efektive, jam antaŭ ol mi fariĝis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL) en 1937 kaj samtempe, pro diversaj kaŭzoj ne menciindaj ĉi tie, fakta redaktoro de *La Suda Stelo*, ni en Jugoslavio, same kiel sinceraj esperantistoj en Pollando, energie kontraŭstaris nazismon-faŝismon kiel ideologion malamikan al homeco kaj al Esperanto. En unu artikolo post la alia mi mem kaj la tiamaj kunlaborantoj «avertis en LSS kontraŭ la kliniĝo de la gvidantoj de la Esperanto-Movado en la faŝismaj landoj kaj kontraŭ la pasiveco de UEA kaj IEL antaŭ faŝismo» (U. Lins en *EeP*, p. 711, diference de U. Lins en la pritraktata libro). Dum la landa kongreso en Zagreb (1937) mi faris paroladon, en kiu mi plian fojon eksplikis la tuthoman valoron de Esperanto, emfazis ĝian inter-

nacie solidarigan rolon kaj levis mian voĉon kontraŭ ĉiuj diktatorecaj kaj totalercaj, naciismaj kaj faŝismaj reĝimoj. Kiel verŝajne rememoras almenaŭ iuj el la ankoraŭ vivantaj tiamaj 500 kongresanoj, preskaŭ ĉiun penson sekvis tondra aprobo. Kaj tio okazis ne en iu demokrata lando *post* la faligo de la naciismaj-rasismaj reĝimoj, sed en duonfaŝisma Jugoslavio en la tempo, kiam hitlerismo estis ĉe la pinto de potenco kaj al multaj ŝajnis nevenkebla. Same mi agis dum la UK en Londono (1938), kiam mi fariĝis estrarano de IEL, kaj dum la UK en Bern (1939). En ambaŭ kazoj la grandega plimulto de la kongresanoj forte apogis la esprimatajn kontraŭnaziajn ideojn.

Ne estas, do, ĝusta la aserto, ke la tuta antaŭmilita neŭtrala movado estis senkolore kaj indiferente neŭtrala (p-oj 116-117), t.e. *pasive* neŭtrala, ĉar almenaŭ Jugoslavia Esperanto-Ligo (aliĝinta asocio de IEL kaj, post la kunfandiĝo en 1948, de UEA) jam ekde la mezo de la tridekaj jaroj agis laŭ la principo de *aktiva* neŭtraleco, konforma al la humaneca neŭtrale-homa karaktero de Esperanto, dum mi mem kiel komitatano A kaj estrarano de IEL klare esprimis la saman starpunkton dum la inaŭguraj solenaĵoj de du universalsaj kongresoj de Esperanto.

Estas vero, ke dum la postmilita UK en Bern (1947) la Komitato per 9:7 voĉoj rifuzis nomi la militon de hitlera Germanio «atakmilito» (p. 116), sed U. Lins prisilentas, ke temis pri mia propono kondamni la hitleran atakmiliton. Ne estas ĝusta la aserto, ke la Tria Laborkunsido de tiu Kongreso «per grandega plimulto malakceptis projekton de rezolucio proponita de la landaj asocioj en Bulgario, Jugoslavio, Rumanio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Palestino kaj Polio» (p. 116), ĉar la projekto estis rifuzita per proksimume du trionoj kontraŭ unu triono de la ĉeestantoj en la plenŝtopita salonego, kion oni ne povas nomi «grandega plimulto». Tiu projekto de rezolucio kondamnis «kun profunda indigno la senombrajn terurajn naziajn kaj faŝistajn krimojn», kies viktimoj estis ankaŭ multaj esperantistoj inkluzive membroj de la familio Zamenhof. Ĝi estis iniciatita kaj verkita de mi, kion plian fojon la aŭtoro de la artikolo aŭ ignoras aŭ prisilentas. Pretere dirite, ĝi estas la sola publika protesto farita en formo de rezolucio en la postmilita historio de la movado. Laŭ mia scio, eĉ ne GEA iam per klara decido kondamnis la naziajn krimojn. Fine, estas prisilentita la fakto ke post tiuj du «malsukcesoj» — se hontindaj, do por la plimulto, certe ne por la malplimulto kaj la proponinto — la Komitato akceptis mian proponon pri kompletigo de art. 4 en la Statuto de la nova UEA per la klaŭzo pri la respekto de la homaj rajtoj kiel esenca kondiĉo por la laboro de la Asocio. Per tio UEA formale

rekonis la decidan gravecon de la respekto de la homaj rajtoj ĉie en la mondo ne sole por efika poresperanta laboro ĝenerale, sed ankaŭ por sia ekzisto kiel sendependa internacia organizado kun propraj personeco kaj fizionomio. Alivorte, tio transformis la antaŭan *pasivan* neŭtralecon en *aktivan*, strikte observatan ĝis la eventoj de Hamburgo meze de 1974. Tiu demando estas detale prilaborita en *Esperanto en Perspektivo*, p-oj 553-561.

Miaj elpaŝoj en Bern (1947) kaj post Bern troviĝis kaj plu troviĝas sur la sama principa linio daŭre manifestata, teorie prilaborata kaj senĉese praktikata ekde miaj plej fruaj jaroj de poresperantaj agadoj ĝis la nuna momento. Tiel estos ankaŭ en la estonteco.

PRISILENTOJ LIGE KUN NEŬTRALECO

Kial necesis prisilenti tiujn kaj multajn aliajn koneksajn faktojn, se ne por provi «malfortigi» — per forigo de la «kontraŭpezo» — mian antaŭhamburgan kaj posthamburgan reziston al partipolitika ekkapero de UEA, kaj mian nuntempan «avertadon kontraŭ la kliniĝo de la gvidantoj de la Esperanto-Movado» en la landoj de la soveta bloko antaŭ la oficiala soveta doktrino, «kontraŭ la pasiveco de UEA» rilate la partipolitikajn agadojn de la blokaj oficialuloj en UEA kaj la persekutadoj de lojalaj esperantistoj en kelkaj el tiuj ŝtatoj. Mi intence uzis la esprimojn de U. Lins pri la «kliniĝo antaŭ faŝismo» kaj «pasiveco», ĉar mi fidis, ke iam, eble eĉ en la proksima estonteco, iu objektiva historiisto prave atakos la esence identan senvertebran kliniĝon de la nuna gvidantaro de UEA antaŭ sovetismo, riproĉos la defetisman pasivecon de la nuna membraro de UEA kaj kun fiero notos la pravecon de nia nuna voĉo de rezisto kontraŭ tiu bedaŭrinda stato, same kiel U. Lins notis la «honorindan ekzemplon» de la Jugoslavia Esperanto-Movado kaj la pravecon de nia antaŭmilita sinteno rilate nazismon kaj faŝismon (*EeP*, p. 713).

En ligo kun tio ankoraŭ iom pri demando jam abunde pritraktita kaj en *EeP*, kaj en *Hamburgo en Retrospektivo* kaj en *Horizonto*: la neŭtraleco.

Estas konate, ke siatempe sufiĉe multaj esperantistoj rezignis partopreni la UK en Köln (1933) pro la nazia reĝimo. Apenaŭ necesas diri, ke ankaŭ mi ne ĉeestis. U. Lins nun memorigas, ke *Heroldo*, tiam redaktata de T. Jung, kuraĝigis la aliĝadon, ĉar «la situacio en Germanio estas pli trankvila kaj pli sekura ol antaŭe». Post la Kongreso la sama *Heroldo* skribis: «*Parte ili sukcesis, la subfosantoj, ĉar venis ne tiom da kongresanoj kiom ni rajtis atendi*» (p. 87). Kompreneble, «la subfosantoj» estis tiuj sinceraj esperantistoj, kiuj kontraŭis la okazigon de universala kongreso en nazia Germanio. Pretere dirite, oni komparu la *tiaman* sintenon de *Heroldo* redaktata de

T. Jung kun la aktuala sinteno de *Heroldo* redaktata de A. Fighiera-Sikorska kaj oni facile konstatos frapajn paralelojn. Por esti justaj necesas diri, ke poste T. Jung ŝanĝis sian starpunkton kaj espe- reble la nuna redaktoro de *Heroldo* iam ŝanĝos la sian.

Pli grava ol la «kliniĝa» skribado de *Heroldo* estis la samdirektiĝo (*Gleichschaltung*) de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj la fina likvido de tiu «merit-plena asocio kun longa tradicio» la 15-an de julio 1936 malgraŭ ĉiuj hontindaj flatoj al nazismo kaj ĉiuspecaj humiliĝoj, inkluzive la forigon de la principo de neŭtraleco el la Statuto. U. Lins skribas pri tio:

«*En la Statuto, kiu ekvalidis la 20-an de aŭgusto /1933/, malaperis la indikoj pri neŭtraleco; Behrendt komuniis la novan devizon: 'Per Esperanto por Germanio!' Konstatante, ke nova trankvileco kaj nova bonfarto 'nun regas en Germanujo dank' al la grandioza, admirinda laboro de nia kanceliero kaj gvidanto Adolf Hitler, kiun ĉiu nacie sentanta germano devas admiri, eĉ adori', la kongresraporto optimisme notis: 'Nun ĉiuj zorgoj foriĝis, ĉar Germana Esperanto-Asocio efektivigis sian Gleichschaltung'. Sed tre baldaŭ montriĝis, ke tiaj revoj estis malpravaj...*»

Aliloke en la sama artikolo li konstatas, ke GEA fine «*perfidis preskaŭ ĉion, kion oni ĝenerale konsideris idea enhavo de la Internacia Lingvo*» (p. 94) kaj li aprobe eĉ citas miajn vortojn: «*unu el la plej malhelaj makuloj en la tuta historio de la Esperanto-Movado*» (p. 89). Lins starigas la demandon: «*Kiel povis okazi, ke GEA, LA NEŬTRALA GEA /emfazite en la originalo/ iris tiun vojon — la vojon de kunlaboro kun profunde malhumana reĝimo?*» (p. 94). Unu el la respondoj estas, ke la tiama, pasiva «*neŭtraleco ne distingis klare tiujn movadojn politikajn, kiuj portis en si trajtojn parencajn kun la t.n. Esperanto-spirito, disde tiuj, kies ideo estis kontraŭa al internacia pensmaniero kaj kies venko signifus malaperon de la bazaj premisoj por fruktodona poresperanta agado*» (p. 95).

Konsentite. Absolute ĝuste en rilato al tiu relative malproksima pasinteco, facile kaj sendanĝere kritikebla kelkajn jardekojn post la faligo de hitlerismo. Sed kio pri la alia el inter «la plej malhelaj makuloj»: la persekutoj kaj mortigoj de esperantistoj en «socialisma» Soveta Unio, kies unupartia totaleca sistemo restis esence sama? Kio pri la *nuntempaj* ĝenufleksadoj antaŭ la oficiala sovetisma «marksisma-leninisma» doktrino? Estas korekte indigniĝi — eĉ se tro malfrue — pro la siatempa forigo de «la indikoj pri neŭtraleco» el la Statuto de la antaŭe neŭtrala GEA, sed kio pri la *nuntempa* forigo de la principo de neŭtraleco kaj pri la ne nur neneŭtralecaj, sed kontraŭ-neŭtralecaj agadoj de la iam fakte «me-

ritplenaj asocioj kun longaj tradicioj» en Ĉeĥoslovakio, Pollando, Bulgario, Hungario kaj tiu parto de Germanio, kiu nun estas GDR kaj en kiu, ekde la tempo antaŭ Hitler, neniam plu povis esti organizita neŭtrala, sendependa Esperanto-Organizaĵo? Kial ne indigniĝi pro la fakto, ke en Sovetio tia organizaĵo neniam ekzistis? Fine kaj ĉefe, kial ne sole profunde indigniĝi, sed ankaŭ firme kaj laŭte protesti, kiel ni faras, aŭ almenaŭ silente plori, kiel, espereble, multaj faras, pro la *forigo de la principo de neŭtraleco el la nova Statuto de UEA* sub la premo de la partio fidindaj kaj nomitaj «gvidantoj» en la malneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj kaj instancoj, aliĝintaj asocioj de UEA, kun la helpo de la «kunvojaĝantoj» kaj la «sukcesa pilotado» de la nuna prezidanto de UEA, kiel montrite en *Horizonto*, n-ro 1/80, p-oj 1-7. Per tio UEA, same kiel sisteme GEA, «perfidas preskaŭ ĉion, kion oni ĝenerale konsideris idea enhavo de la Internacia Lingvo» por uzi ankoraŭfoje la ĝustajn vortojn de U. Lins (p. 94). La granda diferenco estas, ke tiam temis nur pri unu landa organizaĵo, dum nun temas pri tuta aro da asocioj aliĝintaj al UEA kaj, eĉ multe pli grave, pri *Universala Esperanto-Asocio mem*.

Se la antaŭmilita *pasiva* neŭtraleco ne distingis inter ideologioj kaj politikaj sistemoj parencaj al idearo ligita al Esperanto, disde ideologioj kaj politikaj sistemoj kontraŭaj al internacia pensmaniero (v. supre), kio certgrade povas pravigi la sisteman perfidon de GEA, la teorie prilaborita kaj longe praktikata *aktiva* neŭtraleco ja klare distingas inter la du, kaj tial *senigas la nunan perfidon de kia ajn pravigo*. Ĝi estas tutsimple senrezista kapitulaco antaŭ «profunde malhumana reĝimo», kiu ekzekutis kaj mortigis minimume 25 milionojn da siaj civitanoj, inkluzive esperantistojn kaj amason da komunistoj kaj diverstendecaj socialistoj, kaj kies prizonoj, karceroj kaj gulagoj (koncentrejoj) plu plenas je liberecamaj homoj. Al la «plej malhelaj makuloj en la tuta historio de la Esperanto-Movado» aldoniĝas plia, la plej nigra, ĉar ĝi etendiĝas al la tuta UEA.

Kompatindaj Zamenhof, Hodler, Privat kaj centoj da aliaj! Se ili reviviĝus, ili bruligus ĉion, kion ili kontribuis al la grandioza verko de la tuta esperantistaro kaj revenus en siajn tombojn por ripozi en paco. Mi mem iam postsekvos ilin, sed espereble ne antaŭ ol mi sukcesos en ilia nomo kaj en mia propra fini la senmaskigadon de la perfido, veki la dormantojn kaj eble atingi la revenon de UEA al si mem.

KION FAKTE INSTRUAS LA HISTORIO?

Por kompletigi la bildon estu menciite, ke D. Blanke donas jenan instruon, kiu, aŭ li, sekvas el la historio de la Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE):

«*Se la koncepto de politika neŭtraleco estas sterile komprenata, ĝi ne povas savi siajn defendantojn antaŭ pereco aŭ kompromitiĝo*» (p. 60).

Tiu aserto estas falsa konkludo de falsaj premisoj en lia artikolo kaj aliloke en la libro: kvankam IPE kaj ĝiaj gvidantoj komprenis la politikan neŭtralecon nek «sterile», nek nesterile, sed tute forjetis ĝin kaj komplete submetiĝis al la tiama soveta «marksisma-leninisma-stalinisma» linio (soveta *Gleichschaltung*), tio savis ilin nek «antaŭ kompromitiĝo», nek, malfeliĉe, «antaŭ pereco», fizika pereco en la vera senco de la vorto, kion la libro prisilentas. Kontraŭe al tiu kredigo de Blanke, je kiu kredeble li mem ne kredas, la historio de IPE — same kiel la historio de Esperanto sub nazismo — instruas ion tute alian, nome ke neniam forjeto de politika neŭtraleco kaj perfido de la idea aspekto de Esperanto, neniam, eĉ ne la plej sklaveca sandirektiĝo kaj la plej humiliga adorsterniĝo antaŭ la totalismaj potenculoj, povas «savi» kion ajn. Male, ĉio ĉi kun certeco kondukas en etikan, intelektan, tre ofte ankaŭ fizikan pereon. Mi nur sincere esperas, ke D. Blanke kaj la aliaj «ideologoj» de «marksismo-leninismo» en la nuna UEA (kaj, pli vaste, en la movado ĝenerale) ne havos la saman sorton, kiun havis Drezen, Demidjuk, Snejko, Nekrasov, Varankin, Spiridoviĉ, Kuzmiĉ kaj centoj da aliaj. Se tamen ili fariĝos viktimoj — kaj tiaj ili povas fariĝi nur pro la objekte solidariga funkcio de la Internacia Lingvo — ili verŝajne rememoros tiujn ĉi vortojn. En ĉiu okazo ili sciu anticipe, ke mi mem (kaj verŝajne multaj aliaj) tutcerte ne nur indigniĝos, sed ankaŭ publike montros mian indignon pro iliaj suferoj kaj klopodos ilin helpi, ĉar mi ĉiam solidariĝas kun nekrimaj viktimoj de nehumanaj politikaj sistemoj, piedpremantaj la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn, precipe se temas pri esperantistoj, inkluzive tiujn, kiuj sincere esperis utili al Esperanto en siaj landoj eĉ per falsajoj kaj personaj atakoj kontraŭ la oponantojn de politika sandirektiĝo aŭ «enŝaltiĝo». Ili ankaŭ povas esti certaj, ke, kontraste, multaj el la hodiaŭaj aplaudantoj tuj fariĝos laŭtaj renegatoj aŭ kaŝiĝos en siajn musotruojn por malsolidariĝi kaj tiel eviti ilian sorton.

Plue, estas evidente, ke per la citita falsa konkludo D. Blanke admonas, fakte minacas la esperantistaron en la landoj de la soveta bloko ne fali en la retojn de «sterila neŭtraleco», t.e. eĉ ne de la plej milda formo de politika neŭtraleco, ĉar ĝi kontraŭas al la nuna «marksisma-leninisma» koncepto de senideigita Esperanto (pri tio alian fojon). Oni, do, povus atendi, ke tiaj ĝisostaj kontraŭneŭtralistoj etendos sian kamaradecan manon al neŭtrala laborista SAT kaj vaste malfermos la pordon por ĝia aktivado en la «socialismaj» landoj, des pli ke, laŭ la preskaŭ nekredeble absurdaj fantaziaĵoj de

«marksisto-leninisto». A. Rátkai, la historio de Esperanto «*Post 1905 pli kaj pli koneksiĝis kun la historio de la laborista movado*» (p. 28) kaj en la «*postaj periodoj... la laborista esperantista movado definitive likvidis la etburgajn iluziojn*» (p. 171), distinge, verŝajne, de la «*grand-burgaj*» fantaziaĵoj de la novaj ideologoj. Kontraŭe al la atendo, la laborista, ne-neŭtrala, sed demokrata SAT, kies celoj kaj rolo estas plurfoje misprezentitaj en la libro (espereble SAT reagos), ne taŭgas por la nunaj ideologoj, ĉar ĝia programo estas «*kontraŭa al la historia neceso aŭ nereala kaj fantazia*» kaj tial SAT «*devas degeneri*» (p. 60). Fakte, malgraŭ siaj sendubaj meritoj por Esperanto ekde la fondiĝo en 1921, SAT ne taŭgas kaj ĝi ne rajtas libere agi en la landoj de la bloko, ĉar ĝi estas plurtendenca laborista asocio, demokrate organizita, kaj ĝiaj membraro kaj gvidantaro, precipe post la spertoj kun IPE, ne lasas sin facile trompi. Ankaŭ la revivigo de IPE «*fariĝis anakronismo*» en la «*nunaj historiaj kondiĉoj*», ĉar «*multaj idealoj de IPE eniris en la agadon de MEM, fariĝis elementoj en la politiko de la Esperanto-asocioj en socialismaj landoj*» (p. 58) kaj — ni aldonas — en UEA mem kiel aliĝintaj asocioj. Tial D. Blanke plian fojon rekomendas sekvi la saman politikan linion kaj konsilas al «*ne-SAT-emaj laboristaj asocioj aŭ komunistaj grupoj en nesocialismaj landoj*», t.e. en landoj ekster la soveta bloko, «*aktivadi lige kun la komunistaj partioj*» (p. 59) kaj samtempe «*kunlabori*» kun la neŭtralaj landaj asocioj kaj kun la neŭtrala internacia movado (p. 60). Alivorte, eĉ pli intensa penetrado en la lokajn grupojn kaj landajn asociojn por propagandi

la nunan ideologion kaj por malebligi reziston al plua kaj plia unudirekta politikiĝo de Universala Esperanto-Asocio sur ĉiuj niveloj. Apenaŭ oni povas imagi pli apertan rekonon de la politika konspiro en UEA, iniciatita antaŭ Hamburgo, unue malkovrita en la Aprila Artikolo de *Esperanto* (1974) kaj nun vaste realigata. La forigo de la principo de neŭtraleco el la nova Statuto de UEA ankaŭ formale faliĝas la lastan obstaklon kaj plian fojon konfirmas nian prognozon.

Tio estas la vera kompromitiĝo, kiu kondukas al pereco, sed pri tia kompromitiĝo D. Blanke ne pensis. Aŭ, eble, li tamen konsciis pri ĝi kaj en tiu kazo ankaŭ volis ĝin. Kaj la «pacama» esperantistaro plu silentu kaj pasivu!

* * *

Sufiĉas por hodiaŭ. En la sekvanta artikolo ni pritraktos la atakojn kontraŭ la zamenhofan internan ideon kaj kontraŭ mian evoluigon de tiu ideo en la ĝenerala kadro de humaneca internaciismo. Ĉar la soveta «*interlingvistiko*» plu distingas inter «*naturaj*» kaj «*artefaritaj*» lingvoj (eĉ en pluralo), ni iom ekzamenas ankaŭ la sufiĉe amuzan demandon, ĉu la naciaj kaj aliaj lingvoj estas piroj, karotoj, musc'j ks., dum la Internacia Lingvo troviĝas en societo de telefono, telegrafo ks. (p. 216), aŭ tamen ĉiuj lingvoj estas sociaj fenomenoj kun specifaj trajtoj, kiuj havas malmulton aŭ nenion komunan kun la vegetala kaj nehoma animala mondoj, aŭ kun la mekanikaj rimedoj de komunikado.

Ivo Lapenna

NOVA SCIIGO PRI LA INTERNACIA KOMERCA FAKVORTARO EN 9 LINGVOJ

Estas necese aldoni al la linioj de s-ro Munniksma en n-ro 25 de «*Horizonto*» de Februaro 1980 kelkajn rimarkojn:

Laŭ la prezentado de s-ro Munniksma ŝajnas, ke nenio okazus rilate la IKF, ellaborita de 19 aŭtoroj diverslingvaj sub la redakcio de sinjoro Munniksma kaj eldonita de eldonejo KLUWER en Deventer-Nederlando 1974. Tiu valora kaj multflanke uzebla fakvortaro intertempe pruviĝis tre taŭga en praktiko. Ĝi estas tuj uzebla kaj utiligebla ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de ĉiuj entreprenoj kaj organizacioj, kiuj ne regas Esperanton. Sendube tiu IKF estas grandioza kaj admirinda verko de sinjoro Munniksma, kiu ne devas pereji kaj esti forgesita. Li oferis multan tempon kaj energion por la eldono de bonkvalita, unuaranga verko.

Tial la subskribinto, unu el la aŭtoroj kaj EKI-estraranoj, nuntempe el propra iniciativo laboras pri novaj eldonoj de la IKF en aziaj kaj orienteŭropaj lingvoj. La aliaj kunlaborintoj estas malsanaj, mortintaj aŭ tro maljuniĝintaj, la subskribinto mem estas 70-jara, sed esperas ke lia energio sufiĉas ankoraŭ kelkan tempon. Pluraj tradukoj estas faritaj. Preskaŭ ĉiuj ankoraŭ vivantaj aŭtoroj salutis tiun iniciaton kiu celas disvastigi Esperanton kaj samtempe helpi al pli bona interkompreno inter landoj kaj popoloj.

Bruno Vogelmann
D-7180 Crailsheim

REALAĴOJ KAJ MITOJ PRI LA ALSACA LANDO

Se la Altaj Vogejoj kiujn ni vidos dum la ekskurso okazonta dum la VI-a Konferenco de N.E.M. estas la plej imponaj pro siaj Alp-simileco kaj flaŭro, la Mezaj-kaj Nordaj Vogejoj ne estas malpli interesaj. Ili situas en la departemento de la «Malalta Rejno» kaj tiu montaro pludaŭrigas trans la franca-germana landlimo ĝis la Palatinato.

Fakte, promenante en la ekstrema nordo de Alsacio, oni neniam ĝuste scias ĉu oni troviĝas en Francio aŭ en Germanio! La arbaroj estas vastegaj, kaj, marŝante sur vojeto, oni subite vidas, pendiĝitan sur arbotrunko, tabuleton kies surskribadoj estas germanlingvaj, tiel la geografiaj nomoj kiel la informoj pri daŭro de la promeno. Verŝajne oni preterpasis limŝtonon senatente.

En tiu relative malgranda regiono, ĉirkaŭ 40 km. oriente-okcidente kaj 20 km. sude-norde, troviĝas trideko da ruiniĝintaj kasteloj el la mezepoko. Iliaj nomoj rememorigas la hordojn de la Hunoj, kiel ekzemple la «Huneburg»; preskaŭ ĉiuj havas siajn legendojn kaj mitojn.

Unu el la plej interesaj estas la «WALTHARILIED» (la kanto de Valter) kiu rakontas la epopeon de la herooj kiuj batalis ĉirkaŭ la kastelo de WASIGENSTEIN (prononcu «VASIGENŝTAJN») unuafoje menciita en la 1272-a: Walter (francilingve Gauthier) de Akvitanio, filo de Alfaris, reĝo de la Gotoj, Hagen, en la servo de Gibiŝ, la reĝo de la Frankoj kiu reĝas en Worms, kaj Hildegonde, filino de la reĝo de la Burgundoj troviĝas kiel garantiuloj en la kortego de ATILA, la reĝo de la Hunoj. Hagen sin forŝvas, baldaŭ sekvas lin Valter kaj lia amatino Hildegonde, kaj ĉiuj tri, ŝargitaj de riĉaj trezoroj, transpasas la Rejnon. Gunter, la avida filo kaj posteulo de Gibiŝ, avertita per la rakonto de fiŝkaptisto kiu provizis al li fiŝon nekonatan en la akvoj de la Rejno —fakte ĝi estis kaptita en la Danubo— kaj kiu estis la pramisto de la fuĝintoj, ekpostkuris ilin por senposedigi ilin. Intertempe, Valter alvenis en la pitoreskan pejzaĝon de la kastelo Wasigenstein kaj li sin preparas por kontraŭstari sian malamikon. La kunuloj de Gunter forfalas unu post la alia. Gunter kaj Hagen ne partoprenas la batalon kiu finiĝas je la noktigo. Sed, je la tagiĝo, kiam Valter rekomencas sian rajdodon, li estas ekatakita de Gunter kaj Hagen; obstinega luktado komenciĝas. Gunter perdas unu gambon, Valter unu manon, Hagen unu okulon kaj la duonon de sia makzelo. Elĉerpitaj pro tiu homera-luktado, ili bandiĝas siajn vundojn; la nobla fraŭlino preparas la resanigan vinon; la restarigitaj herooj ŝercadas kruelege kaj renovigas la sangon pakton. Valter revenas en sian landon, celebras en Langres (urbo en Burgonio) sian edziĝfeston kun Hildegonde kaj, post la forpaso de sia patro, regas sian popolon dum tridek jaroj, ŝatata de ĉiuj kaj absolute feliĉa!

La nomoj HAGEN kaj GUNTER ankaŭ aperas en la NIBELUNGEN-LIED (la kanto de la Nibelungen), epopeo skribita ĉirkaŭ la 1200-a. Hagen murdas SIEGFRIED laŭ la ordono de Brunhilde; oni scias ke Richard Wagner tiris sian faman dramon el tiu epopeo de la germana kaj skandinavia mitologio.

Multaj legendoj naskiĝis ankaŭ sur ambaŭ flankoj de la Rejno*, tiu rivero kiu vidis tiom da militoj dum jarcentoj, sed kies sorto estas tamen kunigi la iamajn malamikojn en paca Eŭropo.

Multaj verkistoj jam prikantis ĝin. Ni menciuj nur tion kion la granda franca poeto Victor HUGO diris pri ĝi: «La Rejno kunigas ĉion. La Rejno estas rapidfluanta same kiel la Rodano, larĝa kiel la Luaro, travas kiel la Mozo, zigzaga kiel la Sejno, klarega kaj verda kiel la Sommo, historia kiel la Tibero, reĝa kiel la Danubo, mistera kiel la Nilo, surjetita de oraj brilajetoj kiel rivero en Ameriko, vualita de fabeloj kaj fantomoj kiel rivero en Azio».

Ni esperu ke la vetero estos favora kiam okazos nia bankedo apud la Rejnobordo por ke, dum promeno laŭlonge de la rivero, niaj pensoj povu vagadi tra la jarcentoj ĝis la mita epoko kiam oro ankoraŭ sin kaŝis en ĝiaj profundajoj.

M. M.

* Vidu «LA RAKONTOJ DE LA REJNBORDOJ» de Erckmann-Chatrian.

ALFONSINA STORNI estas argentina poetino naskiĝinta en Sala Capriasca (Svisujo) la 29-an de Majo de 1892. Estiel apenaŭ infanino, ŝi kun siaj gepatroj translokiĝas al Argentino, kie tre frue ŝi komencas helpi ilin. Poste ŝi fariĝis instruistino kaj en 1916 eldonis sian unuan libron «La inquietud del rosal». Tamen, baldaŭ ŝi forlasas la romantikemon de tiu unua verko, kaj alpaŝas sub postmodernismajn influojn. Post du vojaĝoj al Eŭropo, ŝi publikigis «Mundo de siete pozos» (1934) kaj «Mascarilla y trébol» (1938), verkoj en kiuj ŝi atingas la pinton de sia evoluo: ekde la sponta lirismo de la unuaj versoj, ĝis la baroka hermetismo de la lastaj. Ŝi ankaŭ verkis teatraĵojn kaj mallongajn novelojn. Kelkfoje ŝi uzis la pseŭdonimon «Tao-Lao». En 1938, malsana de kancero, ŝi sinmortigis.

MI ESTAS TIU FLORO

Via vivo estas fluoriĉa riverego,
kies borde mi ĝermas kun diskret' kaj tenero.
Mi estas tiu flor' kaŝita de la junkaro,
kiun vi nutras senrigarde ĉe l' pasado.

Kiam vi tro kreskas, mortas mi en via sino,
kaj kiam vi sekas, mi pereas en la ŝlimo;
sed denove mi ekfloras dolĉe kaj tenere
kiam la belajn tagojn iras vi fluoplenĉe.

Mi estas tiu floro humile kaj silente
burĝonanta ĉe viaj bordoj ĉiuprintempe.

—oOo—

Vicigitaj domoj, vicigitaj domoj,
vicigitaj domoj.
Kvadratoj, kvadratoj, kvadratoj.
Vicigitaj domoj.
La homoj havas la animon jam kvadrata,
ideojn vice
kaj angulon dorse.
Mi mem elverŝis hieraŭ unu larmon,
Dio mia, kvadratan.

Traduko far: *Liven Dek*

KVAR POPULARAJ KANTOJ

I. Kancenelson

ANGELO PLORAS

Anĝelo ploras, anĝelo ploras.
Malsekiĝas la herbej' de plor'.
Amato mia, amato mia,
al vi sopiras mia kor'.

Vagadas mi en la fremdej'.
Vagadas hejmen la memor'.
Amato mia, amato mia,
al vi sopiras mia kor'.

Pasis nokto de sopir'.
Vekis min matena hor'.
Amato mia, amato mia,
al vi sopiras mia kor'.

LA SUN' JAM MALAPERAS

La sun' jam malaperas.
En flam' subiras ĝi.
Paliĝas la espero,
la bela song' de mi.

La nokt' estas malluma,
senfina nigra hor'
simila al la ploro
de rompita mia kor'.

Hom', ne malesperu!
La nokt' tuj pasos for.
Por mi ĝi restos ĉiam
nigra kun angor'.

LA NAIVULINO

Bela estas mia amato
kaj ĉion scias li.
Kiel arde li kisas,
kun kia energi'.

Komence mi ne permesis,
sed li klarigis, ke en ĉielo
de ĉiu lia kiso
naskiĝas anĝelo.

Ni sidas en Ĝardeno.
Nokto. Briletas la steloj.
Ho, kiom multe nun supre
naskiĝas anĝeloj.

KIAM ĈARMAS LA PRINTEMP'

Kiam ĉarmas la printemp'
kaj kreskas belaj floroj,
la amatinon karan mian
mi vidas en memoro.

Kvankam ŝi forlasis min,
ŝi restis en mia koro.
Ĉiam, ĉiam dum printemp'
kreskas belaj floroj.

De nia reciproka am'
restis nur angoro.
Ĉiam, ĉiam dum printemp'
kreskas belaj floroj.

Kiam ĉarmas la printemp'
kaj kreskas belaj floroj,
la amatinon karan mian
mi vidas en memoro.

El jida tradukis
Ben Alter J.

Festparolado de la 19 aj Internaciaj Floraj Ludoj okazintaj en la urbo Rubí, la 29-an kaj 30-an de septembro 1979-a

Honorinda Reĝino,
Aŭtoritataj Moŝtoj,
Gesinjoroj,

Kiam, antaŭ 57 jaroj okazis la 8-aj Internaciaj Floraj Ludoj en Girona, mi, tiam juna ĉeestanto, estis komisiita iri al la Reĝino por ricevi diplomon en la nomo de la premiito, nia neforgesebla poeto Julio Baghy, ĉar li ne povis alveturi por la solenaĵo. Pli poste, nur 50 jarojn, kun aliaj samideanoj mi reveturis tiun urbon por propaganda arango kaj mi havis la surprizon kaj la plezuron renkonti samideaninon jam tre maturan, kiu tiam estis la Reĝino, la plej bela floro de la festo. Mi povis do repremi emocie tiun maneton, pri kies ekzisto mi absolute nenion sciis. Certe, malgraŭ la pezaj 50 jaroj sur la korpo, ŝi radiis mense kaj brilis okule rememorante la majestecon de tiu rava Festo okazinta en ŝia fora, ne plu revenonta juneco.

Nun, Vi, simpatia kaj honorinda Reĝino, anstataŭas ŝin en la festotrono, kaj mi esperas ke ankaŭ Vi radios mense kaj okule brilos kiel nun, kiam post aliaj 57 jaroj Vi renkontiĝos kun samideano nun juna, kiu, kiel mi faris, repremos al Vi la manon profunde kortuŝite por via honoro, via ĉarmo, via feliĉeco kaj la bono de Esperanto.

Gesinjoroj,

«Ni diris hieraŭ» estis la unuaj vortoj de Fray Luis de León al siaj lernantoj, post plurjara restado en inkvizicia malliberejo de Valladolid. «Ni diris hieraŭ» ni povas rediri nun, post 40-jara paŭzo, en nia lingva, paca, belarta penado. Ni povas imagi nin kiel arbon starantan en la mezo aŭ la centro de l' Sociaj Uraganoj, kiuj impete puŝas, skuas, taŭzas, tordas, ŝiras kaj sekigas ĉion delikatan, noblan, spiritan kaj profunde homan. Nia gorgo tamen ne sekiĝis. Ni suferis akran longedaŭran afonion, kiu devigis nin silenti dum 40 jaroj, nome dum duona generacio. Sed nenio daŭras eterne, ankaŭ ne la uraganoj, kiuj, ĉion detruinte, stompigas ĝis malapero; kaj la tempo, konsiderata ĉiamdaŭra, estas nur homa fikcio aŭ pli ĝuste nenio. Se ni fermas la okulojn dum momento ni revidas nin en la pompaj solenaĵoj de niaj antaŭaj, brilaj Floraj Ludoj, kiuj aranĝite de la spertaj manoj de niaj katalunaj pioniroj okazadis Hieraŭ. Nun ni malfermu la okulojn kaj ni revidas Hodiaŭ, nun, la postpaŭzan sed saman manifestiĝon de niaj reviviĝintaj Floraj Ludoj, kiel frukton de la ne mortema obstineco de tiaj homoj, kies vivocelo paradokse troviĝas en ideale sopirata estonteco.

Nia paŭzo ne estis la unua longa paŭzo en la Historio. Okazis certe aliaj eĉ pli longaj paŭzoj. La Floraj Ludoj naskiĝis antaŭ ĉirkaŭ dumil jaroj en Romo. Ili estis la FLORALES LUDI farataj honore al Flora (aŭ Klorisa laŭ la grekoj), diino de Floroj kaj Gardenoj, en la monato Aprilo. De tiam, kiom da paŭzoj okazadis en la malvolviĝo de la Poezio? Ĉar la arto esprimi la emociojn kaj la amon per la parolmuziko estas kunnaskita en la homo, la Poezio manifestiĝas, malgraŭ la trudataj paŭzoj, tra la tuta historio kaj malgraŭ la oftaj uraganoj ŝirantaj branĉojn de la menciita metafora arbo; malgraŭ ĉio la poezio reburĝonas el la trunca bazo kvazaŭ nepra celo de la homa vivo.

Post la romanoj reprenis la torĉon de la Floraj Ludoj la araboj en la tempo de l'kalifoj Harum Eerrasad kaj lia filo Almamun, ĉirkaŭ la 170-a jaro de la heĝiro, nome okcent jarojn poste, en Córdoba, Granada kaj Toledo. Kun paŭzoj kaj sen paŭzoj venis la jaro 1323-a, kaj la katakuno Ramón Vidal de Besalú iniciatis reokazigon de Floraj Ludoj en Toulouse. Iom pli poste, sesdek-ok jarojn, nome en la jaro 1391-a la reĝo Joan primer d'Aragó establis ilin en Katalunujo, kie li fondis, similan al tiu de Toulouse, la Akademion de l'Gaja Scio. Sekvis dudek-jara dekadencia paŭzo ĝis la jaro 1413-a, kiam la reĝo Ferrán primer d'Aragó subvenciis la Florajn Ludojn po kvardek orflorenoj ĉiujare. Estas kurioze ke en tiu tempo la reĝo havis tempon kaj monon por Floraj Ludoj.

Mi ne scias kiom da ventetoj, uraganoj aŭ eĉ tajfunoj traskuis la landon en tiu epoko; sed la paŭzo daŭris jam tricent jarojn, kiam en Barcelona ekfermentis la sento kataluneca, la sopiro rehavi sian naturan lingvon, la bezono revivigi sian parolmuzikon, la verŝajna iluzio organizi pompajn Florajn Ludojn. En la jaro 1859-a, sep homoj memorigindaj el nia freŝa historio, nome Joan Cortada, Manuel Fontanals, Lluís Pons, Joaquim Rubió, Manuel Victorià Amer, Víctor Balaguer kaj Antoni de Bofarull, petis kun sukceso al Magistrato de Barcelona, permeson kaj helpon por la revivigo de Floraj Ludoj. La Magistrato en historia dato, la dek-unua de marto, konsentis la restarigon kaj decidis subvencii po ducent kvindek pesetoj ĉiujare; kvanto nun ŝajne ridinda.

La unua celo de tiu-ĉi historia skizo estas konsciigi, ke la Floraj Ludoj ne estas nura kapricaĵo de utopiemaj verkistoj kaj poetoj. Kio daŭras jam dumil jarojn, tio ne povas esti bagatelo. Tio certe respondas al spirita bezono same necesa kiel la korpa nutraĵo. La dua celo estas evidentigi la similecon, la saman ekzistorajton de la katalunaj kaj Esperantaj Florludoj en, pri kaj por la literaturo en la respektivaj lingvoj.

La kataluna lingvo suferadis plurcentjaran dekadencan. Post la cititaj katalunaj reĝoj, sub kies regado la lingvo respondis al ĉiu socia bezono kaj tial ĝi povis eĉ troni

super multaj lingvoj simile al grandkorola helianto tronanta super la floroj, sekvis obstina malhelpado pro erara, centriga, ŝtatiga, unueca koncepto de la novaj registoj. La forto naskas forton, la malŝato malŝaton, la malamo malamon; sed ankaŭ la homaj eraroj ne daŭras eterne. La ŝajne sekiginta arbo subite reburĝonis, kaj la lingvo en la koroj kaj la buŝoj de la spontane naskiĝantaj novaj bardoj reimpetis ne nur en la literaturon kaj la poezion, sed ankaŭ en la ĉiutagan vivon. La Floraj Ludoj estis la tindro ekflamigonta la novan etapon de la lingvo, kaj la jaro 1859-a estis iel la deirpunkto, la apero, la deestiĝo, la reviviĝo de la lingvo kataluna.

Kiam niaj katalunaj pioniroj establis en nia lando la Florajn Ludojn, ili certe konsciis la valoron de tia literatura manifestiĝo; ili sendube sentis, ke ĝi povus esti la motoro puŝonta Esperanton tra la tuta lando same kiel ĝi revivigis aŭ vekis la katalunan el tiu dekadenco dormado. Esperanto tiam estis juna, freŝa lingvo, kiu bezonis, kiel ankoraŭ nun, la helpon, la amon, la oferon de tiaj homoj, kiuj havas sian vivocelon en la estonteco, ĉar la hordoj de egoismaj profitekuloj neniam povis prosperi inter honestaj, pli-malpli mistikaj idealanoj.

En la jaro 1859-a la reorganizantoj de la Katalunaj Floraj Ludoj riskis mokojn, misjuĝon kaj personan malprofiton; sed ili esperis — kaj la espero vivigas — ke la revekita lingvo akirus prestiĝon, koherecon, aktualecon kaj gramatikan kompletecon. Tio fakte okazis, eble pro justa sopiro, sed nur cent jarojn poste, post la restarigo de la miljaraj Floraj Ludoj; kaj kvankam Esperanto en siaj unuaj Floraj Ludoj estis juna lingvo, proksimume tridek-jara kaj naskita kun preta gramatiko, estis necese, same kiel nun, elprovi ĝin, kirli kun ĝi la mil kaj unu facetojn de la homa penso, provizi ĝin per miriado da esprimoj internacie klaraj, naturigi ĝin per la uzado, rafini ĝin en la nuancoj, depreni de ĝi eĉ la nomon «arte farita» kaj liberigi ĝin de tiuj falsaj sektectoj kaj politikeco per kiuj misinformitaj aŭ perversaj malsamideanoj intencadis travesti ĝin kaj fari burleskajn el la nobla, jam preta solvo de lingvo internacia, por kiu faris tiom da oferoj centoj kaj eĉ miloj da homoj havantaj la vivocelon en la estonteco.

Kiel diris la fama franca humanisto Víctor Hugo, ĉio devas kreski en la lumo: floroj, homoj kaj pensoj. Nia komuna, dorna entrepreno ĉiam kreskis en la lumo. Ĝi neniam estis nigra romano nek fantasmagorio. Neniam ni penadis en mistero, neniam ni estis tirdadene movataj kiel marionetoj, de nevidebla nigra mano, neniam ni agadis sekrete, subplanke, neniam ni komplotis. Nia lingva celo estas nobla, diafana kaj necesa. Nia instrumento, Esperanto, estas destinita al ĉiu homo de ĉiu raso de ĉiu lando, por forigi la interpopolan baron, nome la lingvan malsamecon kiu dividas la popolojn multe pli akre ol la limŝtonoj pli-malpli dense starigitaj inter la landoj, ĝuste sur ne videblaj linioj.

Niaj Floraj Ludoj, kiel eksponento de nia belarta penado, malvolviĝas en la suna helo, kun diafanaj koroj, en arta medio, kun senombraj pensoj, akompanate de ĉarmaj belulinoj por kiuj antaŭ centoj da jaroj la araboj jam konkursadis noble per la parolmuziko de siaj poeziaj verkoj. Kie estas do la nigra romano, la fantasmagorio, la tenebra nigra mano?

Neniam en la homa historio la aplikado de humanismaj principoj estis sufiĉa motivo por reciproka amo kaj respekto. La homa koro havas reversion kiel medalo, kaj sub la toleremo kuŝas la krueleco, sub la humileco la fiereco, sub la amo la malamo, sub la bono la malbono reprezentata metafore per la diablo insidanta konstante en la profundecon de la animoj. La kristanoj mortis milope pro sia humanismo murdate, buĉate, martirigite en kruelaj cirkaj spektakloj tre plaĉaj al brutigita kaj brutala popolo de la tiama Romo, la plej potenca en la mondo, kiu nur vivaĉis kun la kapo sub la botoj de l'tirano. Kaj tamen, kia estis la delikto, la granda krimo de tiuj martiroj? Eble tia, ke ili prezentis kolekton da maksimumaj moralaj tiel valoraj, ke nun, post centoj da jaroj ankoraŭ validas tiel altgrade, ke neniu filozofo aŭ moralisto kapablis prezenti pli koheran doktrinion por paca kunvivado en ordo, amo kaj reciproka respekto.

Nia entrepreno estas de tiu speco. Home neŭtrala lingvo interpopola ja estas la embrio de unueca homaro, de unu sola monda popolo. Dume ĝi faciligas la interlandajn rilatojn, naskas interamikecon, kreskigas la solidarecon, forgesigas la fremdecon kaj aŭtomate bremsas aŭ nuligas la ŝovinisman de blindumitaj naciistoj, kiuj per komuna lingvo povas malkovri, ke ilia lando aŭ nacio ne ĉiam estas la plej supera nek la plej dezirinda. Tial, kvankam nia humila entrepreno bazita sur humanismo ne havas nek povas havi materialan povon, ĝi ne plaĉas nek povas plaĉi al la nigraj fortoj de la renverso de nia supre dirita alegoria medalo: kaj la sperto instruis al ni, ke kiam la unu-persona regado trudas silentige sian volon al tuta popolo aŭ duona mondo, la komuna lingvo, kiel libera komunikilo inter homoj kaj landoj, fariĝas eksterminda instrumento pro sia latentia humanismo. Tion ni vidis en Portugalujo, en Japanujo, en Germanujo kaj ankaŭ en Rusujo, kie ni havas martirojn pro Esperanto; kaj grava simptomo de nia tempo estas, ke tiun fakton — la martirigon de samideanoj — oni de tre supre en nia propra entrepreno, sengravigas kaj prisilentas kvazaŭ la homoj estus nur ridindaj kaj sen signifaj bagateloj.

Nia tuta vivo trafluas prilumate de l'Esperanta Stelo, kaj nia devo estas averti pri ĉia ebla danĝero, denunci malkovritan manovron, preventi la eblan ruinigon de nia Movado kaj prikonsciigi la samideanaron. Absolute ne helpas la struta taktiko. Por nepre

ĝui trankvilecon oni povas vindi al si la okulojn, ŝtopi la orelojn, eĉ ligi al si la langon; se danĝero nestas, danĝero restas, kaj tiu beateco rezultanta el ignoro de atentindaj faktoj povas pli poste fariĝi fatala kaj ne transvivebla malespero. Du danĝeroj minacas Esperanton, ambaŭ kiel silentemaj reptilioj: Unue, la maskitaj, travestiitaj atakoj al nia lingva Fundamento, ekz. sub formo de onidire negravaj alfabetŝanĝoj, atakoj al nia Akademio, provoj revivigi mortintan projekton, ŝanĝoj de vortoj, kampanjo por speco de latinida mikspoto k.a., kaj due, la enmanigo de nia tuta entrepreno al direktistoj de politikaj partioj, kies intenco pri Esperanto neniam estis klare formulita, kaj kiuj pruvis, fakte, per sia indiferenteco, nehelpemo kaj eĉ malhelpado, ke la tutmonda interkompreniĝo supernacia estas en iliaj koroj nur sursable formulita Idealo oble konsiderota duavice, ĉar ne grava, iam en fora estonteco.

Ni gardu do la lingvan unuecon, kiel ni gardas tiun de niaj propraj lingvoj per la unueca uzado. Ni riĉigu ĝin, kvankam mondampleksan, kiel ni riĉigas la niajn per la necesaj terminoj pli kaj pli universalaj. La lingvo estas la spino kiu tenas rekte kaj stare la popolan korpokonsiston; ankaŭ ni estas nova, malgranda, sed universala popolo, kiu sen lingva unueco — la fortika spino — tuj disfalus.

Ni gardu do la lingvon de partieco, de tiu serpente enrampema politikigo. Ni gardu ĝian tradician neŭtralecon, dank' al kiu ĝi rezistis ventadojn dum preskaŭ cent jaroj. Esperanto estas destinita al ĉiu homo kaj sekve neniam sekto nek partio rajtas ĝui ekskluzivecon, ĉu por sia uzado, kio estus ne malbona, ĉu por ĝia ruzeca velkigo kaj fina pereigo, kio estus krimo historia. Ni iru do antaŭen kun naiva fido sed kun konscia gardemo por ke la Floraj Ludoj, kiel manifestiĝo de la arta lingva potenco, naskiĝintaj antaŭ dumil jaroj kaj aplikataj nun al plifortigo, al solidigo, al perfektigo kaj beligo de la racia lingvo de universaliganta popolo, fariĝu ĉiujare pli interesaj, pli belaj, pli brilaj, pli ravaj kaj sukcesaj; por ke novaj ĉarmaj reĝinoj prezidu ilin kaj per sia beleco incitu la novajn poetojn kaj verkistojn ankoraŭ junajn akriĝi la pinton de siaj plumoj kaj surprizi nin per la parolmuziko de siaj literaturaj verkoj, ofte dediĉitaj, kiel en pratempo, al siaj amatinoj.

Vivu la Reĝin' de niaj floroj,
vivu la beletra ambicio,
vivu la impuls' de niaj koroj,
vivu la kantad' de l' trobadoroj
en la Florludad' de l' Poezio!

Koran dankon, Reĝina Moŝto,
Gesinjoroj, dankon.

Salvador Gumà

FUNDACION "ESPERANTO"

INTERNACIA LITERATURA KONKURSO

La Patronaro de la «Fundación ESPERANTO» decidis dum kunsido okazinta la 29-an de februaro 1980-a organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto.

Estos du premioj:

1.^a - Premio «Sancho-Rebullida», 10.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

2.^a - Premio «Fundación ESPERANTO», 5.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj originalaj verkoj libervole elektitaj en la temoj: Popola Rakonto aŭ Priskribo pri urbo aŭ regiono kun la monumentoj kaj moroj.

R E G U L A R O

- 1) Ĉiu konkursaĵo ampleksu 4-5 foliojn.
- 2) Ĉiu konkursanto sendu kvin ekzemplerojn de la konkursaĵo tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj.
- 3) La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la Konkursanto, kaj en aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
- 4) Kiam publikiĝos la Verdikto, publikiĝos samtempe la nomoj de la juĝintoj.
- 5) La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 30-a de septembro 1980-a.

La Verdikto publikiĝos en la Tago de Zamenhof, la 15-an de decembro 1980-a.

Kun la indiko: «Por la Konkurso de "Fundación ESPERANTO"»; oni sendu la tekstojn al Inés GASTON. P.^o de la Constitución, 35, 4.^o dcha. ZARAGOZA-1. Hispanujo.

Zaragoza la 20-an de marto de 1980-a

Inés Gastón
Sekretario de la
«Fundación ESPERANTO» kaj de la Konkurso

HUMANECA FARO EN ALBERNDORF (AŬSTRUJO)

La 26-an de oktobro 1979 — la Aŭstria Nacia Festotago — en la malgranda aŭstria komunumo Alberndorf, proksima al la ĉeĥoslovaka limo, oni solene inaŭguris «Domon de la Homaj Rajtoj» kaj transdonis ĝin al la ceramik-artisto Franz Maxera, fuĝinto el Ĉeĥoslovakio.

La nomita komunumo, kiu cetere portas ankaŭ la titolon «Komunumo de Eŭropo», estas subtenanta membro de «Aŭstria Ligo por Homaj Rajtoj» — superpartia organizaĵo por defendi, firmigi kaj diskonigi la Homajn Rajtojn en Aŭstrujo. Kun la helpo de ĉiuj enloĝantoj de la komunumo kaj kun afabla subteno de multaj firmaoj kaj entreprenoj, malnova domo estis renovigita kaj adaptita kiel loĝejo kaj laborejo. Franz Maxera, kiu siatempe subskribis la Carton 77 kaj devis forlasi Ĉeĥoslovakion, ricevis nun novan ekzistadan bazon en la renovigita domo.

En ĉeesto de multaj gravaj personoj de la publika vivo, la prezidanto de la Aŭstria Ligo por Homaj Rajtoj, Alfred Ströer, senvualigis la tabulon «Domo de la Homaj Rajtoj», kiu estis fiksita sur la konstruaĵo. Post muzikaj prezentadoj, deklamado fare de lernantoj kaj eklezia benado, la domo estis transdonita al Franz Maxera. En simpla maniero li kore dankis al ĉiuj ĉeestantoj pro la bonfaro kaj konstatis, ke li nun trovis novan hejmon kaj novan hejmlandon en Aŭstrio.

En la komunumo Alberndorf oni akcentis, ke la Domo de la Homaj Rajtoj ne estu provoko al la najbara Ĉeĥoslovakio, sed ĝi estu konsiderata kiel daŭra admono, observi la rajtojn de la homo.

En Alberndorf jam la infanoj en la lernejo lernas: «Estas via devo kunpensi, kunparoli, kunelekti, kunlabori... sed ankaŭ: La Homaj Rajtoj estas nedivideblaj».

En la 31-a jaro post la Universala Deklaracio do malgranda komunumo plenumis gravan humanecan faron. La inaŭgura aranĝo certe estis taŭga kaj digna por soleni la Nacian Festotagon.

Klaus Perko

NI KONDOLENCAS

Kun profunda bedaŭro, ni ĵus informiĝis pri la forpaso de,

S-ino ARMANDE THIERRY

patrino de nia kara amiko, redaktoro de «Horizonto» Jean Thierry, al kiu ni esprimas nian sinceran kondolencon, pro neevitebla perdo. Pacan ripozon al ŝi!

Ankaŭ en Francujo forpasis du el niaj fidelaj samideanoj kaj amikoj,

S-ro ROGER DESBORDES, de Elisabethville

kaj

S-ro JOSEF NELS, de Pantin

Ili pace ripozu!

Por iliaj familioj, nian plej sinceran kondolencon.

DONACIOJ POR «HORIZONTO» - 1980

Félix Navarro, Valencia (Hispanujo)	400 ptoj.	J. Benito, Zaragoza (Hispanujo)	400 •
Emilio Pérez, Zaragoza (Hispanujo)	400 •	Anonime (Svedujo)	1.563 •
Salvador Gumá, Reus (Hispanujo)	770 •	Helmut Sonnabend, Peine (Germanujo) .	975 •
Gesinoroj Maynar, Guía de Isora (Hispanujo)	400 •	Friedrich Busse, Hannover (Germanujo) .	225 •
Walter Kaukal, Neustadt (Germanujo) .	600 •	Josef Eder, Landshut (Germanujo)	225 •
Casanovas-Cano, Zaragoza (Hispanujo) .	500 •	Karl-Heinz Mischler, Zürich (Svislando)	225 •
Joaquín Bielsa, Zaragoza (Hispanujo) .	400 •	Juan Bruno, Villanueva y Geltrú (Hispanujo)	400 •
José Clarianas, Zaragoza (Hispanujo) ...	500 •	S-ro Fairbanks, Paris	1.200 •
José Olavide, Zaragoza (Hispanujo)	400 •	Claudia Tissot, St. Etienne (Francujo) .	800 •
José Soler, Valencia (Hispanujo)	400 •		
			10.783 •

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. Ivo Lapenna,
N-ro 19

35 DELEGITOJ DE UEA DENOVE REGISTRATAJ ĈE POLITIKA POLICO

El cirkulero de s-ro Linhart Rýznar, ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥoslovakio, de novembro 1979, plian fojon klare montriĝas, ke la «delegitoj de UEA» en tiu lando estas fakte nomataj de politikaj instancoj, registrataj ĉe la politika polico kiel «eksterlandaj funkciuloj» kaj tial ne plu povas esti rigardataj kiel delegitoj de UEA, sed kiel delegitoj de tiuj instancoj en UEA (v. ankaŭ eron 26 de tiu ĉi rubriko en *Horizonto*, n-ro 1/79).

Al la cirkulero, en kiu troviĝas pluraj gramatikaj eraroj, estas aldonita «Respondilo de la Delegito». Punkto C de la Respondilo enhavas «proklamon» /deklaron/, kiun la «sinproponinto» devas subskribi. Ĝi tekstas: «*En kontakto kun eksterlando mi respektos la programon de la Landa Esperanto-Asocio kaj de la ŝtato. Mi rifuzos servojn, kiuj povus malutili al la Esperanto-Movado kaj al enlanda evoluo.*».

Apenaŭ necesas diri, ke la programoj de la Esperanto-instancoj en Ĉeĥoslovakio, ambaŭ aliĝintaj asocioj de UEA, estas identaj al la ŝtata-partia politika programo. En sia cirkulero la ĉefdelegito de UEA klarigas, ke komenciĝis «nova registardo» de la delegitoj laŭ la «novaj preskriboj» (ŝtataj, kompreneble) kaj ke necesas denove plenigi la Respondilon, eĉ se la koncerna persono «jam dum pluraj jaroj plenumis la delegitan funkcion». Li daŭrigas: «Per plenigo de la Respondilo vi ankaŭ plenumas la kondiĉon, laŭ kiu vi estos registrita kiel eksterlanda funkciulo. Tiun taskon prizorgos la Ĉeĥa Esperanto-Asocio post la ricevo de ĉiuj Respondiloj de UEA-delegitoj». La sinproponon devas apogi per siaj subskriboj «du funkciuloj» de la loka Esperanto-grupo, aŭ «du membroj de ĈEA kun multjara membreco», evidente politike fidindaj, kiuj «funkcias kiel viaj garantiintoj» (ne tre agrabla «funkcio», se la «delegito de UEA» tamen iel devotiĝas de la «programo»). Eĉ post la plenumo de ĉiuj-ĉi kondiĉoj la «sinproponinto» ankoraŭ ne rajtas fariĝi delegito, ĉar la finan decidon faras «la estrarkunsido de la Landa Esperanto-Asocio» (legu: la partiaj funkciuloj en la du estraroj), kiu, se la delegiteco estas aprobita, informos pri tio la «sinproponinton» kaj la CO de UEA. Krome, kiel dirite, ĝi sendos la tutan liston kun detaloj pri ĉiuj «delegitoj» kaj garantiintoj — en tiaj kondiĉoj feliĉe ne tre longan — al la politika polico.

Ke tiuj reguloj estas komplete kontraŭaj al la antaŭa Statuto de UEA, ne povas esti dubo. Sed oni povas demandi sin, ĉu la kondiĉoj pri politika fideindeco respondas eĉ al art. 13 de la nova Statuto, laŭ kiu nur «landa asocio... vaste malfermita al la civitanoj de sia lando, sen ekskluzivoj pro politika aŭ religia sinteno... «povas aliĝi al UEA. Eble tamen troviĝos almenaŭ kelkaj komitatanoj de UEA, kiuj ne «restos kontentaj pri la plenumo de la kondiĉoj» de art. 13 «por daŭra aliĝinteco» almenaŭ en tiu ĉi kazo.

Antaŭ multaj jaroj N. Hohlov verkis komedieton *La Morto de la Delegito de UEA*. Temis pri ŝajna fizika morto. Eble iu sprita nuntempa verkisto povus skribi tragikomedieton ne pri ŝajna, sed pri fakta morala morto sub la sama titolo.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 12.2 kaj ĉap. 18.4.2.6 de *Esperanto en Perspektivo*.

36 NUN ANKAŬ ĈINIO ATAKATA

Laŭ *der esperantist* n-ro 95, la reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj en Bulgario, Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, Germana Demokratia Respubliko, Hungario, Pollando (ĉiuj aliĝintaj asocioj de UEA, do konsista parto de tiu organizaĵo), Soveta Unio kaj Vjetnamio (ŝajne ankoraŭ nealiĝintaj) dum sia 12-a Interkonsiliĝo en Viŝegrad (Hungario) akceptis rezolucion, per kiu ili «esprimas sian fortan indignon pri la malica agreso de Ĉinio kontraŭ la pacama Socialisma Respubliko Vjetnamio, pri la barbaraj krimoj de la ĉinaj trupoj kontraŭ la civila vjetnamia loĝantaro» (p. 10).

Do, al la «imperialismaj agresoj» de Usono, Israelo kaj aliaj «imperialismaj» landoj nun aldoniĝas «malica agreso» kaj «barbaraj krimoj» de Ĉinio, laŭ nia scio iam rigardata kiel socialisma lando fare de la ŝtatoj en la soveta bloko. Ĉio ĉi okazas en la kadro de UEA, tute konforme al la nova Statuto de tiu Asocio.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.2.1.2 de *EeP*.

37 PLIAJ AKADEMIANOJ MALAPROBAS LA KONTRAŬSTATUTAN ELEKTON

En ero 31 de tiu ĉi rubriko (*Horizonto* n-ro 6/79, p. 113) estas prezentita la kontraŭstatuta kaj tial nevalida elekto de la Estraro de la Akademio. Poste, almenaŭ du pliaj membroj de la Akademio — D-ro K. Söderberg kaj R. Eichholz — esprimis la

opinion ke pro la malregulaĵoj necesas nuligi la elekton kaj okazigi novan. Eble estis ankaŭ aliaj, kiuj ne sendis al mi kopiojn de siaj leteroj, sed pri tio ne eblas informiĝi, ĉar Mag. W. Auld, la neelektita prezidanto, prisilentis tion en siaj du ĝisnunaj cirkuleroj, tiel ke eĉ la membroj de la Akademio ne povas scii kio fakte okazas en nia ĉefa lingva institucio.

Sekve, almenaŭ 8 malnovaj kaj bone konataj membroj de la Akademio konstatis la neregulecon de la elekto kaj postulis okazigon de nova, demokrata, laŭstatuta. Ili estas Mag. R. Rossetti, Pastro J. Downes, D-ro A. Albault, Prof. J. Régulo Pérez, S-ro D. B. Gregor, D-ro K. Soderberg, S-ro R. Eichholz kaj la redaktoro de tiu ĉi rubriko.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20 de EeP.

JUBILEAJ DATREVENOJ

La Fu-Jen K. Universitato de Taipei, en la monato decembro 1979-a festis la kvindek-jaran datrevenon de sia fondiĝo; je tiu okazo, oni aranĝis serion da festoj kaj festenoj, inter aliaj, ekspozicion pri ekster-kursaj agadoj de la studentaj grupoj aŭ societoj, tre nombraj en la Universitato; nia «Fu-jen Esperanto-Societo» partoprenis en la Ekspozicio, per prezentado de ĉirkaŭ tridek Esperantaj Libroj, precipe gramatikoj, vortaroj, legolibroj, konversaciaj gvidlibroj, Antologioj kaj la Fundamenta Krestomatio de D-ro Zamenhof. Ekzempleroj de diversaj Esperantaj revuoj, ekzemple, Horizonto, Espero Katolika, Heroldo de Esperanto kaj Esperanto de UEA troviĝis en la Ekspozicio. La verda standardeto kaj la portretoj de D-ro Zamenhof kaj de Papo Pio X-a ornamis la ekspoziciejon. Multaj gestudentoj de Fu-jen Universitato kaj profesoroj de aliaj Universitatoj vizitis nian Ekspozicion la 15-an de decembro, kaj interesiĝis pri la Internacia Lingvo.

Duan Jubilean datrevenon festas nun niaj samideanoj de Taipei. La 18-an de januaro Prof. Pastro Johano B. Se-ĉien Kao festis la 50-jaran datrevenon de sia sacerdotiĝo. Por memorigi tiun datrevenon, liaj amikoj kaj studentoj eldonis kolekton de liaj artikoloj verkita en Ĉina, Angla kaj Esperanta lingvoj kaj publikigitaj en diversaj gazetoj kaj revuoj ĉinaj kaj alilandaj, dum lastaj 50 jaroj. Oni povis kolekti ĉirkaŭ naŭdek artikolojn, kiuj formas tri volumojn, entute 980 paĝojn. La unua volumo enhavas liajn artikolojn pri la internacia lingvo kaj pri Esperanto. Espereble tiu ĉi volumo servos por plia disvastigo de la Internacia Lingvo en Ĉinujo.

Pensoj de Zamenhof:

PRI LA EVOLUO DE LA INTERNACIA LINGVO

«La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo. t.e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj.» (Originala Verkaro, p. 399.)

PRI LITERATURO

«La batalantoj por nia ideo jam longe konvinkiĝis, ke ĉiu nova grava verko, kiun ni povas montri al la publiko, efikas sur ĝin pli, ol ĉiaj plej lertaj teoriaj paroloj... Sed kiam la konstanta kreado de nia literaturo (kun ĝi ankaŭ la konstanta elasteco de la lingvo) iom post iom silentigos niajn nudavortajn malamikojn kaj malaperigos ĉian dubon pri la vivipoveco de nia lingvo, tiam vole-nevole, post 1 aŭ post 10 aŭ post 25 jaroj, la registaroj devos aliĝi al ni, kaj tiam «lingvo tutmonda» fariĝos fakto plenumita...» (Originala Verkaro, p. 206.)

UNUA TUT-AMERIKA ESPERANTO-KONGRESO

San Luis, Argentino, 12-15 Julio 1980

La argentinaj esperantistoj invitas al ĉiuj samideanoj en la mondo, amerikanoj, kaj ne amerikanoj, partopreni en ĉi tiu grava evento, por la disvastigo de Esperanto en tiu Kontinento.

Ĉar, kiel grava ero de la provizora interesa programo, oni entreprenis la starigon de aktuala inpona ekspozicio, ni helpu al niaj geamikoj, per sendado de taŭga materialo: poŝtkartoj kun saluto al la Kongreso, revuoj, ktp.

Konstanta adreso por via korespondado: Unua Tut-Amerika Esperanto-Kongreso Casilla Correo Central 289 - 2000 ROSARIO, Argentino.



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

LA TELEPATIO KAJ ĜIA KULPO EN LA HOMAJ RILATOJ, de Sokratis Sakellaropoulos. Ateno 1978-a. 2-a Eldono plibonigita.

La aŭtoro de «Fedon de Platon» nun prezentas traktaton pri Telepatio. La interesatoj trovos en la libro la sekvantajn ĉapitrojn: La Telepatio kaj ĝia socia signifo. Eksperimentaj pruvoj pri Telepatio. Kazoj de aŭtomata Telepatio. Influo de la pensoj sur la homoj. Konkludoj. La postmorta sorto de la Homo. La telepatio en la okultismo. Teorio kaj praktiko de Psikvolio. Telepatio kaj Esperanto. La plej granda donaco. Rezultatoj de Eksperimentoj de granda distanca Telepatio laŭ bildoj. La bibliografio.

Mi ne volas fali en la pekon prijuĝi kredon, religion aŭ mondkoncepton, kiun mi ne studis ĝisfunde; sed se la prezentitaj strekfiguroj rezultintaj el sendo de la penso trans plurajn centojn da kilometroj estas veraj, kaj se la ekzemploj cititaj pri spontanaj, ne eksplikeblaj sciigoj aŭ konsciigoj pri faktoj okazintaj aŭ okazantaj eĉ tre malproksime estas ankaŭ veraj, tiukaze oni devas koncedi, ke la homoj havas kapablon ĝenerale ne konatan, eble nur embrian aŭ inverse, eble preskaŭ atrofiigintan pro la ĉiutage pli arte farita medio en kiu la homoj vivadas jam de la pratempo.

Al mi neniam estis klare, kiel la serpentetoj preskaŭ ekstermitaj en nia latitudo, rampante sur la vastega grundo inter herboj, ŝtonoj kaj plej ofte en ŝirmaj densaj veprejoj, povas renkontiĝi por pariĝo. Samateme mi memorigas pri la eksperimentoj de la fama entomologo Fabre pri grandaj papilioj. Tamen, eĉ se la dirita penskapablo vere ekzistas, ĝi ne implicas — miaopinie — tiun specialan, religiecan kosmogonion aŭ teologian mondkoncepton, kiun oni facile spiras en okultismaj medioj. La vualo ĉirkaŭ la Tero ekŝiriĝis kaj per la planed esploroj oni jam preskaŭ certigis, ke nia malfeliĉa homaro estas sola en nia planedaro blinde vaganta sencele ĉirkaŭ nia Suno.

La aŭtoro, samideano Sokratis Sakellaropoulos, evidentigas ke li estas prikompetenta. La temo ne estas banala sed transcenda. Interesatoj legu la libron kaj ili ĉerpos abundan instruon pri Telepa-

tio, laŭ la ĉapitroj supre menciitaj. La lingva stilo estas tre klara; enŝovigis eraretoj eviteblaj per reviziado de alilandulo. La artikolo UNU estas kontraŭkultime tro ofta, kaj LANCI estas verbo de LANCO kaj ne taŭgas por lanci, jeti, elsendi, radii...

Turnu vin al S-ro Sokratis Sakellaropoulos,

Aghias Paraskevis 30

ATENO (816)

Grekujo

Salvador Gumá

POEMOJ, de Edward Thomas. Tradukis: Kris LONG.

La poeto Kris Long ne timas alfronti malfacilaĵojn plenumante indajn traduktaskoj poeziajn. Li praktike uzas siajn proprajn rimedojn, kaj enpenetras en la fenomenan mondon de elstaraj poemverkistoj kun kreipova talento.

En mia unua recenzo publikigita en HORIZONTO, el la tri kiun mi dediĉis al la laboro de tiu grava tradukisto, mi menciis tiujn respektivajn skolojn aŭ personajn manierojn kaj teknikojn pritrakti la tradukarton de Grau Casas kaj Kalocksay. Nun mi volas, krome, menciigi du nuntempajn tradukistojn, kiuj mirigas ĉiujn per rezultoj eksterordinaraj. Jen: Fernando de Diego, kiu konigis, precipe, multvalorajn juvelojn de la hispana poezio apartenanta al la Ora Jarcento, kaj G. Waringhien, kiu antaŭ ne multe donis en la paĝoj de tiu-ĉi gazeto praktikajn lecionojn pri la maniero tradukadi kiel eble plej fidele, kaj por prestiĝigi tiel la lingvon Esperanto.

Sed ni diru, ke de Diego kaj Waringhien, same kiel Grau kaj la genia hungaro, ne timis forŝovi la rimitajn poemojn, ĵonglante, do, per esperantlingvaj perfektaj rimoj. La tasko estas, evidente, duoble malfacila. La tradukoj de Kris Long ne havas tian karakterizon, supozeble, pro la specifa formo de la originalaj poemoj, sed oni devas serĉi lian virtuozecon en la denseco de la interna mesaĝo de ĉiu vorto trafe, ĝuste, elektita.

La poemoj de Edward Thomas (1878-1917) estas profundaj, meditigaj kaj plenaj je simboloj kaj sencoj esoteraj kiuj

partoprenas kune, en la transcenda ludo lirika aŭ priskriba. La lingvo, kiu tiel alproksimigas al ni la poeton kiu mortis militante en Arras, fluas kun granda precizeco kaj rara esprimpovo, dank' al la karakteriza kapablo de Kris Long, kiu, ofte, ŝajnigas flugi pli alten ol la originala diro.

La versaĵoj ne estas absolute hermetikaj, nek abstraktaj, tamen ili postulas de la leganto nepran klopodadon kaj profundan konon de la poezia arto, por ke ĉiu poemo manifestigu travidebla.

Nur tre kapablaj esperantistoj kaj konantoj de la poetikaj sekretoj, povos ĝui kaj gustumi tiun kolekton kaj la veran talenton de Edward Thomas.

Tri poemojn tradukis Victor Sadler. Jen malgranda specimeno: «Nun pasio, / deziro, ambicio, / ĉia ĝoj' aŭ ĉagreno, / plej dolĉa aŭ amara, / finiĝas en dormo pli kara / ol nobla peno» (paĝ. 23).

G. Mora

VULKANE, de Emily Dickinson. Tradukis: Kris LONG.

Kris Long entreprenis novan kaj ardan taskon tradukan: tiufoje, esperantigi poemojn de Emily Dickinson (1830-1886). Tiu broŝuro 40-paĝa estas, mi opinias, rezulto konscia kaj tre karakteriza, ĉar oni ne decas supozi ke tiu tradukinto povus banale agadi sur tiu kampo beletra. Kvin poemojn el tiu kolekto, «Vulkane», tradukis Wiliam Auld, do, entute, ĉiu poeziamanto havas la eblon serioze enprofundiĝi en la fenomenon poetika kaj en modernan teĥnikon tradukan.

Ĉu la poezio estas nur tiu arto esprimi per vortoj mielaj, ritmo kaj rimoj belajn sentimentojn kaj plaĉajn aspektojn de la mondo kaj la vivo, kaj ankaŭ komprenigi ilin per alia lingvaĵo aŭ leksikono tiel malsama — sed, sufiĉe facila — ol tiu kutima? Eble tio estis aparta aŭ flanka aspekto de iu tuto, en la komenco de ĉiu naskiĝanta nova landkulturo, sed la fenomeno de la poezia esprimado prenis multajn aliajn celojn kaj rimedojn tra la jar-miloj kaj la maturiĝo de generacioj.

Ne ĉiu persono kapablas kompreni poezion, laŭ ĝenerala aspekto, same kiel ne ĉiu povas tute nature ensekretiĝi pri la klasika muziko. Sed ne ĉiu poeto celas tion: ke oni facile povu kompreni lin, t.e., lian kreaĵon. Do ni prave povas paroli pri hermetika poezio; sed ne ĉiu hermetika poezio nepre estas abstrakta. La kataluna poeto Gabriel Ferrater, por ekzemplo, estas tre konkreta, sed por la plimulto estas tre, tre malfacile enpenetri en liajn poemojn, kiuj preskaŭ prezentiĝas tute nature kiel sfinksaj enigmoj.

«Vulkane» estas ankaŭ malfacila poemlibro, ĉar la poetino volis esprimi sin per frazoj, konceptoj kaj ideoj kiuj povas ŝajne esti nekoheraj: «Grande la jaroj - lunarkas - supre - / mondoj ark-ĉizas - / ĉielo - naĝas - / for - diademoj - kaj doĝoj - sindonas - / punktoj senŝonaj - sur disk' el nego - (paĝ. 2).

En aliaj poemoj, la stancoj lumas pli senco pli klara, sed la cerbo facile, tro ofte, dronas, malgraŭ (aŭ, pro) la bunta miksaĵo de bildoj kaj metaforoj.

Por iuj, legado de tia poezio, kaj konsekvenca pristudado, estas supera ĝuo; sed por aliaj, tio estas, aŭ estus, turmento.

La esperanta lingvo, en «Vulkane», aspektas fajna; do, supozeble, Kris Long sukcesis en sia malfacila entrepreno, malgraŭ iuj vortturnoj kiuj eble atencas la logikon espriman.

G. Mora

NE TIEL SED ĈI TIEL. Simplaj sugestoj por agrabla kontakto kun blinduloj (1974) Herman Van Dyck. El la nederlanda tradukis J. Koning kaj aliaj. Antverpen: Flandra Esperanto-Ligo, 1979. Broŝureto ilustrita, 32 paĝoj, 17 cm. Prezo: 2,70 gld.

65-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. Stockholm 1980. Dua bulteno, broŝuro 48-paĝa, formato 13,5 x 20,5 cm.

Kiel kutime ĝi enhavas la programon kaj informojn pri la Kongreso kaj la kongresa urbo kaj lando Svedujo. La bulteno estas abunde kaj bele ilustrita.

K L A R I G O

Kiam en 1977-a okazis la devaluto de la peseto, mi petis al ĉiuj abonantoj ke:

«Malgraŭ la devaluto de la peseto kaj pro la alta plialtiĝo de la kostoj en Hispanujo, mi petas ke vi ĉiuj pagu favore al la revuo, la saman ĝisnunan kotizon en via respektiva valuto.»

Ĉar tio ne donis rezulton ĉijare la abonkotizoj estis denove ĝustigitaj, laŭ la kurzo de la diversaj valutoj. Kiam mi informiĝis pri la decido plialtigi je 20 % la kotizon, mi tuj akceptis ĝin, sed mi faris la kalkulon laŭ la kostoj ĉar la afranko por la ceteraj landoj estas preskaŭ 14-oble pli alta ol por Hispanujo kaj Portugalujo. Tial la malsama kotizo por pago al la Administracio.

Kaj, mi ripetas: Kiu sendos per banko pagon al la Administracio de «Horizonto», bv. aldoni 100 pesetojn por kovri la banko-kostojn. Dankon!

Inés Gastón

VI-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Strasburgo, Francujo, 26/7 ĝis 1/8/1980

Konstanta adreso: S-ino M. Muller, 80, Bd. Clémenceau, F 67000 Strasburgo
Poŝtekkonto: 673 93 N, Strasbourg

I N F O R M O J

Konferencejo

Ĝi estas; «Foyer du feune ouvrier chrétien», 6, rue de Bitche, en la norda parto de Strasburgo.

Loĝado

Por la restado en la Konferencejo validas la jeno:

Loĝado estas rezervenda por la tuta konferenca periodo.

Por unu persono la prezoj estas jenaj:

650 F.F. en 1-lita ĉambro

550 F.F. en 2-lita ĉambro

520 F.F. en 3-lita ĉambro

Tiuj prezoj inkluzivas la jenon: lito, ĉiuj manĝoj ekde la vespermanĝo sabaton la 26-an de julio ĝis la tagmanĝo la 1-an de aŭgusto (kun escepto de la vespermanĝo dimanĉon) ĉiuj servmonoj, litotukoj kaj impostoj. Tualalettukojn oni bonvolu mem kunporti.

Oni bone notu ke la nombro de unulitaj ĉambroj estas tre limigita.

Malmendoj de loĝado en la Konferencejo kun repago de la tuta pagita sumo minus 100 F.F. povos okazi ĝis la 15-a de junio 1980.

Akceptejo

Sabaton la 26-an de julio la akceptejo ekfunkcios je la 10h30.

Provizora programo

La du ĉeftemoj de la Konferenco estas:

«Lingvodiverseco kiel obstaklo al kreo de eŭropa konscio» kaj «La stato de la Esperanto-Movado en 1980 kaj la rolo de N.E.M.».

Ekskursoj

Vizito per aŭtobuso al la vidindaĵoj de Strasburgo kun klarigoj en Esperanto (Eksk. A) 25,00 F.F.

Tuttaga aŭtobusa ekskurso al la belega regiono de Altaj Vogezoj inkl. de tagmanĝo en tiea restoracio kaj malpeza vespermanĝo en tipa vilaĝo apude de Strasburgo (Eksk. B) 130,00 F.F.

Bankedo ĝi okazos en restoracio sur la bordo de la rivero Rejno kun bela panoramo super ĝi kaj parko apude 75,00 F.F.

Kiu ne havas Aliĝilon rapide petu ĝin de la konstanta adreso!

M. Muller

Prez. de la Loka Organiza Komitato

53-a KONGRESO DE S.A.T.

La 53-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (S.A.T.) okazos de la 19-a ĝis la 25-a de julio 1980 en Rijeka, Jugoslavio, apud la bordo de la Adria maro.

Informojn kaj aliĝilojn oni povas peti ĉe la Kongres-adreso: M. Jakupović, str. Franje Matkovića 16, YU-51000 Rijeka.